Aŭtoro: Mariola Pytel

# Bestoj

* Por uzi ĉi tiun materialion vi bezonas paperajn vortarojn aŭ vortarojn en poŝtelefonoj.

## * Vortprovizo:

hundo koko ĉevalo kapro lupo porko papago strigo sciuro muso kato kobajo bovino araneo formiko azeno rano kokcinelo kulo anaso papilio testudo talpo erinaco vulpo simio vespo abelo rato korniko aglo urso serpento elefanto muŝo leporo ŝafo foko cigno korvo

## * Gramatikaĵoj: -id-, -ar-, -n, vir-, -in-, ge-

## * Proverboj:

A. Saĝa hundo post la vundo
B. Ne venas rato mem al kato.
C. Sur arbon kliniĝintan saltas la kaproj.
D. Ne naskas porko leonidon, nek korniko aglidon.
E. Kiu havas abelojn, havas mielon.

F. Rano eĉ en palaco sopiras pri marĉo.
G. Vizaĝo sen kulpo, sed koro de vulpo.
H. Ne mia estas la ĉevalo, min ne tuŝas ĝia falo.
I. Ne taŭgas du ursoj por unu nesto.
J. Serpenton oni povas eviti, sed kalumnion neniam

K. Ne trovante bovinon, oni ŝtelas kokinon.
L. Eĉ malgranda muŝo ne estas sen buŝo.
M. Laboro ne estas leporo — ĝi haltos, ne forsaltos.
N. Fari el muŝo elefanton.
O. Se birdo tro bekas, la katon ĝi vekas.

1. **Kunigu la bestojn kun iliaj nomoj. Uzu vortaron, kiam necesas.**

hundo koko ĉevalo kapro lupo porko papago strigo sciuro muso kato kobajo


1 ……………………


2 ……………………


3 ……………………


4 ……………………


5 ……………………


6 ……………………


7 ……………………..


8 ……………………


9 ……………………


10 ……………………


11 ……………………


12 ……………………

2. **Skribu la ĝustan nomon kaj respondu la demandojn.**

**A** Kiu el tiuj bestoj **ne** estas insekto? ……………. 

bovino araneo formiko







……………………… ……………………… ………………………..

**B** Kiu el tiuj bestoj estas mamulo? …………..

azeno rano kokcinelo







…………………… ……………………… ……………………..

**C** Kiu el tiuj bestoj estas birdo? ………………

kulo anaso papilio







……………………. ……………………... …………………….

**D** Kiun el tiuj bestoj vi povas teni hejme? ………………

testudo talpo erinaco







………………………… ………………………. …………………………

**E** Kiu el tiuj bestoj vivas en arbaro? …………..……………

vulpo simio vespo







…………………… …………………… ………………….

3. **Skribu la ĝustan nomon.**

**K**







**k…….….…… k……p……... k……….…**



k……b…….



k……c……



k…………..

# A



a………n….



a……s…….



a……e…..

# P



p…………..



p…………



p………li….

# S



s……ur…..



s……g…….



s……m…….

## T/F







**t……ud…..** **t……l…….** **f……mi…….**

## V/H







**v……..…..** **v…………...** **h…………**

## B/ĉ/E







**b…….in……** **ĉ……val…….** **er……c…….**

## L/M/R







**l……..…..** **m…… …….** **r………**

4. **Respondu la demandojn.**

a. Kiujn bestojn vi havas hejme?
b. Kiujn bestojn vi volas havi hejme?
c. Kiuj bestoj estas dangeraj?
d. Kiuj bestoj estas kutime sovaĝaj?
e. Kiuj bestoj estas kutime dombestoj?
f. Kiujn bestojn timas homoj?
g. Kiuj bestoj timas homojn?

5. **Analizu la fotojn kaj kompletigu la vortojn. Ĉu vi komprenas la signifon de la sufiksoj '-id-' kaj '-ar-'?**

**A**


Kato


Kat – <u>id</u> -oj


Hundo


H.............


Cigno


Cigno kaj kvar .........

**B**



Lupo



Lup-<u>ar</u>-o



Ŝafo



ŝ...........



Foko



f.............



**Arbo**



**a.........**

**6. Priskribu la fotojn. Ne forgesu aldno '-id-' kaj '-ar'.**

leono homo anaso



**L……….. kaj ……………**



**A……………**



**A……….. kaj ……………..**



**H………………..**

7. **Bestaj nomoj en Esperanto plej ofte estas neŭtraj. Kiam vi volas emfazi la sekson de iu besto, vi povas uzi:**

| | | |
|---|---|---|
| ♂ | **vir-** | **por vira sekso** |
| ♀ | **-in-** | **por maskla sekso** |
| ♀ + ♂ | **ge- ….. -j** | **por ambaŭ seksoj** |

**A Legu:**



**vir- bovo**



**bov -in- o**



**ge- bovo -j**



**bov -id- o**

**B Skribu:**



…………………..



…………………..

 …………………….

 ……………………

 …..........................

 ……………………..

**8. Kompletigu la proverbojn. La vortoj ofte rimiĝas. Vi povas uzi „Esperantan proverbaron”.**

hundo abelojn rato kaproj kato aglidon

A. Saĝa ………… post la vundo

B. Ne venas ……….. mem al …………...

C. Sur arbon kliniĝintan saltas la …………...

D. Ne naskas ………….. leonidon, nek korniko ………………..

E. Kiu havas …………., havas mielon.

ursoj ĉevalo rano vulpo serpenton

F. ………. eĉ en palaco sopiras pri marĉo.

G. Vizaĝo sen kulpo, sed koro de ………..

H. Ne mia estas la …………, min ne tuŝas ĝia falo.

I. Ne taŭgas du ………… por unu nesto.

J. …………….. oni povas eviti, sed kalumnion neniam

elefanton kokinon bovinon leporo birdo muŝo katon

K. Ne trovante …………, oni ŝtelas …………..

L. Eĉ malgranda ………. ne estas sen buŝo.

M. Laboro ne estas ………….. — ĝi haltos, ne forsaltos.

N. Fari el muŝo …………

O. Se ………… tro bekas, la ……….. ĝi vekas.

**9. A. Ludu ŝaradon. Desegnu aŭ montru per gestoj la beston. Demandu: „Ĉu vi intencas montri/desegni leonon?**
**B. Priskribu al via partnero la beston.**

| | | | |
|---|---|---|---|
| katido | hundo | bovino | krokodilido |
| rano | ……….. | cigno | fokaro |
| formiko | porko | araneo | muso |
| geratoj | kokaro | simio | vespo |
| kulo | papilio | kobajo | virĉevalo |
| strigo | azenino | sciuro | kokcinelo |
| erinaco | testudo | kapro | papagino |
| korniko | geanasoj | desegnu  | montru  |

**10. Legu la historion kaj marku la vortojn rilatajn al bestoj. Rakontu al via partnero la tutan historion: unu alineon vi kaj poste ŝanĝiĝi.**

Korvo konstruis sian neston sur insulo, kaj kiam la idoj jam estis grandaj, ĝi volis transporti ilin sur la kontinenton. Ĝi do prenis per la ungegoj unu korvidon kaj ekflugis super la maro. Atinginte la mezon de la vojo, ĝi jam estis laca, komencis malpli rapide svingi la flugilojn kaj pensis: „Nun mi estas forta kaj ĝi malforta, mi portos ĝin trans la maron, sed kiam ĝi fariĝos forta kaj plenaĝa kaj mi maljuna kaj malforta, ĉu ĝi rememoros miajn penojn? Ĉu ĝi portos min de unu loko al alia?”

Kaj la korvo demandis la idon: „Kiam mi estos malforta kaj vi forta, ĉu vi portos min? Diru al mi la veron!” La korvido timis, ke la patro ĵetos ĝin en la maron kaj respondis: „Mi portos”. Sed la maljuna korvo ne kredis tion kaj ellasis la idon el la ungegoj. La korvido falis kiel ŝtono kaj dronis en la maro. La maljuna korvo sola revenis sur la insulon.

Poste ĝi prenis duan idon por porti ĝin trans la maron. Denove ĝi laciĝis en la mezo de la vojo kaj demandis la idon, ĉu ĝi portos ĝin de loko al loko, kiam ĝi estos malforta. La ido ektimis, ke la patro ĵetos ĝin en la maron, kaj diris: „Mi portos”.

La patro ne kredis ankaŭ al ĝi kaj ĵetis ĝin en la maron. Kaj la maljuna korvo revenis en sian neston, tie jam estis nur unu ido. Ĝi prenis la lastan infanon kaj ekflugis super la maro. Sentante sin laca en la mezo de la vojo, ĝi demandis: „Ĉu vi nutros kaj portos min, kiam mi estos senforta de la maljuneco?” La korvido respondis: „Ne, mi ne portos vin”. „ Kial?”- demandis la patro. „Kiam vi estos maljuna, kaj mi granda kaj forta, mi havos mian propran neston kaj miajn infanojn.” La korvo pensis: „Ĝi diris la veron. Mi penos per ĉiuj fortoj kaj nepre transportos ĝin”.

La maljuna korvo ne ellasis la korvidon. Per lastaj fortoj ĝi svingis la flugilojn kaj alportis ĝin sur la kontinenton por ke ĝi konstruu neston kaj havu proprajn infanojn.

(el: Violin Oljanov, Neno Janev, Postkursaj legaĵoj, Bulgara Esperantista Asocio 1985)

**11. Skribu vian propran historion kun bestoj.**

................................................................................................
................................................................................................
................................................................................................
................................................................................................
................................................................................................
................................................................................................
................................................................................................
................................................................................................
................................................................................................
................................................................................................
................................................................................................
................................................................................................
................................................................................................
................................................................................................
................................................................................................
................................................................................................
................................................................................................

**Filmscenaro - infano (I) parolas kun sia patrino (P).**

**I:** Panjo, mi volas havi hejmbeston…

**P:** Kiun, Petro?

**I:** Mi volas havi grandan leonon kun flava kolhararo. Mi vidis ĝin en televido.

**P:** Petro, tio estas sovaĝa besto. Oni ne povas teni sovaĝajn bestojn hejme.

**I:** Kial?

**P:** Sovaĝaj bestoj ĉasas aliajn bestojn, kiam ili malsatas. Ili povas ankaŭ mortigi homojn.

**I:** Do mi volas havi bovinon. Kris diris, ke liaj geavoj havas bovinojn kaj ili estas tre afablaj bestoj. Danke al ili li povas trinki freŝan lakton ĉiutage. Mi ankaŭ revas pri tio, sed mi preferas bovinon kun ĉokolada lakto. Panjo, ĉu ni povas aĉeti bovinon kun ĉokolada lakto?

**P:** Petro, ne ekzistas bovinoj, kiuj produktas ĉokoladan lakton. Ĉiuj bovinoj havas la saman lakton, ĝia lakto nur povas esti pli aŭ malpli grasa. Sed oni ne povas teni bovinojn hejme.

**I:** Kial?

**P:** Ili estas grandaj bestoj kaj en nia hejmo ne sufiĉas spaco por ĝi.

**I:** Mi komprenas. Bovinoj povas bloki sin en pordo. Tio estas danĝera. Do… mi volas… muson. Ili estas malgrandaj bestoj. Mi certas, ke ili ne blokas sin en pordo.

**P:** Mi ne ŝatas musojn. Mi eĉ timas ilin. Mi ne volas teni musojn hejme.

**I:** Do mi havas pli bonan ideon! Ni povas havi katon. Ĝi ne estas sovaĝa besto, ĝi ne estas granda besto kaj ĝi ne blokos sin en pordo! Kaj ĝi gardas nian hejmon, por ke ne estu musoj ene!